n-ro 95

marto 2008

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## UK: Vizito al la haveno de Rotterdam

Dumkongresa ekskurso por IKEF-anoj kaj interesitoj estas ĉiujara tradicio. Ĉijare, je jaŭdo, la 24a de julio 2008, posttagmeze, ni vizitos la havenon de la kongresurbo. Por tio intervenis nia nederlanda membro Kees Ruig.

Atentu! Pro sekurecaj kialoj la havenaŭtoritatoj antaŭe bezonas la liston de vizitantoj. Se vi deziras partopreni la viziton, **necesas plej laste fine de junio anonci vin** ĉe ikef(a)telenet.be. Surloke necesos montri identigilon.

## Ĝenerala kunveno de IKEF

Dum la universala kongreso, je komunikota dato, okazos la laŭstatuta ĝenerala kunveno de IKEF. Legu detalojn je p. 3.

## Enhavo

Ĝenerala kunveno . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Jarraportoj - Kongreso en Malagasio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4-8
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 9-10
Novaj membroj - TAKE - Kontoj de entreprenoj . . . . . . . . . . . . . 11



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio ‘A’ (‘riĉaj landoj’) kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio ‘B’ (‘malriĉaj landoj’). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo (laŭ plena tarifo). Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c* - www.moneybookers.com (konto=retadreso de kasisto)
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

## **Ĝenerala kunveno de IKEF**

Dum la universala kongreso, je komunikota dato, okazos la laŭstatuta ĝenerala kunveno de IKEF. Sur la tagordo estas la aprobo de la jarraportoj pri 2007, la definitivigo de la ĝis nun provizore reduktitaj kotizoj, la (re)elekto de estraranoj kaj diversaĵoj.

Dum 2007 IKEF daŭre funkcietis kun limigita estraro. La estraranoj Kurz kaj Wang atingas ĉi-jare la finon de sia oficperiodo; je redaktofino de ĉi tiu numero ili ne ankoraŭ informis la redaktoron/kasiston pri sia rekandidatiĝo.

Ĉar IKEF bezonas kompletan kaj pli aktivan estraron por bone funkcii, mi urĝe alvokas interesitajn kaj laborpretajn membrojn sendi al mi sian kandidatiĝon por la estraro, cele al aperigo en la retpaĝaro de IKEF (www.ikef.net, rubriko 'aktuale') sufiĉe frue antaŭ la UK.

Membroj kiuj ne povas ĉeesti la kongreson sed tamen volas voĉdoni, havigu skriban rajtigilon al membro kiu ĉeestos kaj samtempe (plej laste kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso!) informu min pri tio.

Roland Rotsaert, kasisto de IKEF (ikef(a)telenet.be)



## **Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2007**

### Ĝenerale

Dum la pasinta jara ne okazis ĝenerala kunveno. La reelekto de la estraranoj Hornecker, Kiess Mates, Ooba kaj Rotsaert okazis per poŝta voĉdonado. Krom informkunveno dum la UK, en Jokohamo por la membroj ankaŭ estis organizita vizito al la tiea haveno. En Ĉinio okazis je 15-17 septembro 2007 sukcesa renkontiĝo de IKEF-anoj en la havena urbo Rizhao, kun 34 partoprenantoj. Simila aranĝo estas planata por 2008; oni esperas povi ankaŭ akcepti al ĝi neĉinajn vizitantojn.

Rilate al terminologia laboro nur menciindas la aldono de franca indekso, far Jean-Pierre Ducloyer (nemembro), al la 'Sindikata Terminaro', iam eldonita de IKEF surbaze de EU-terminaro. Ambaŭ konsulteblas je la rubriko 'eldonoj' de la IKEF-retpaĝaro.

### Revuo kaj retpaĝaro

Kiel pasintjare la revuo 'La Merkato' aperis nur dufoje. Tio ŝajnas esti sufiĉa aperritmo. Cetere, eĉ kun nur du numeroj jare, malfacilas kolekti interesan enhavon por ĝi.

La retpaĝaro estas alirebla (krom per la reala adreso http://users.telenet.be/ikef/) per la facile memorigeblaj adresoj www.ikef.net, www.ikef.info kaj www.ikef.org. Evidentiĝis ke tiu lasta adreso estas ofte neatingebla; tial nun okazas provo por transigi ĝin al alia retprovizanto. La nombrilo de la paĝaro funkcias ekde du jaroj; en tiu periodo estis 6.000 vizitantoj. La aspekto iom malmoderniĝis, sed precipe la tekstoj bezonus reverkadon.

En oktobro subite malaperis la servo kiu prizorgis nian esperantan 'forumon'. Provizore ĝi estis anstataŭita per anglalingva servo. Serĉo de esperantlingva forumo ĝis nun restis vana.

Membroadministrado

Meze de 2007 okazis la definitiva transiro de la malnova membroadministrado sur la komputilo de la kasisto, al nova, rete alirebla membroadministrado gastigita de la firmao Hornecker.

Kvankam s-ro Braun, la ĉefa iniciatinto de la novigo, sisteme alskribis la membrojn por instigi ilin registri siajn personojn informojn en tiu datumbazo, ĝis nun nur proksimume duono de la membraro faris tion. Ankaŭ helppaĝoj en La Merkato kaj propono skribe transdoni la registrotajn informojn ne multe helpis.

Almenaŭ trifoje okazis ke membro kiu deziris kompletigi siajn informojn, anstataŭ tio faris tute novan membroregistradon. Oni ne sukcesis eltrovi en kiu fazo de la proceduro tia eraro okazis.

Restas kelkaj detaloj plibonigendaj. I.a. ne eblas registri tre longajn nomojn kaj adresojn kaj restas kelkaj lingvaj eraroj en la menuoj. La administranto povas, krom la individuan rigardon de informoj de iu membro, ankaŭ havigi al si membroliston (tra CSV-eksporto, t.e. *Excel*-listo, tamen ne kun ĉiuj informoj). Surbaze de tia listo eblas (kun aldona manipulado) ekzemple fari adresetikojn aŭ verki memorigilojn pri membrokotizo, sed ne fari la distingon inter membroj kiu deziras ricevi la revuo papere aŭ rete.

Teorie je jarfino estis 120 membroj. Tamen, inter tiuj 8 membroj lastfoje pagis sian kotizon por la jaro 2005 kaj 15 por la jaro 2006, malgraŭ pluraj memorigoj. Eble iuj reaktiviĝos, sed fakte la reala membronombro estas ĉirkaŭ 100. Dum la pasinta jaro estis registritaj 8 novaj membroj.

Financoj

La spezokonto kaj bilanco troviĝas sur la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo (por la reta versio: en aparta .pdf-dokumento).



[en la papera versio ĉi tie estas la spezokonto kaj bilanco]

[en la papera versio ĉi tie estas la spezokonto kaj bilanco]



La detalaj librotenaj dokumentoj estis senditaj al la revizoro, d-ro G. Polerani. Je la 1a de marto 2008 li informis la kasiston ke, post ekzameno de ĉiuj dokumentoj, li trovis ĉion en ordo kaj ke, pro tio, eblas submeti la rezulton de la jaro 2007 al la aprobo de IKEF-anoj dum la venonta UK. Je redaktofino ankaŭ la estaranoj Hornecker kaj Kniess Mates aprobis ĝin.

La diferenco inter enspezoj kaj elspezoj montras, kiel dum la pasintaj jaroj, malgrandan pozitivan saldon, ĉi-foje je 120,39 eŭroj. Tio signifas ke la duonigitaj kotizoj sufiĉas por eldoni du numerojn jare de la revuo kaj por kovri la kostojn de funkciado de la asocio.

Ĉar ne estis iu grava eldon- aŭ alia projekto, la monrezervoj de IKEF restis je la sama nivelo. Bedaŭrinde, la eroj 'Servoj diversaj' kaj 'Makleraĵo pro anonco Monato' jam de jaroj montras nulon.

Laŭ konsilo de ĉina membro fine de 2006 estis malfermita reta bankkonto je *Moneybookers*. Transpagoj ene de la klientaro de *Moneybookers* okazas fulmrapide kaj tiu servo estas perfekta. Tamen, estas ege komplika proce-duro por fari transpagon ekde *Moneybookers* al alia banko. Unua provo en novembro 2007 malsukcesis; dua provo en januaro 2008 estis sukcesa.

Dum 2008 ekfunkcios unueca pagsistemo en la eŭro-zono. Eble pro ĝi la rolo de la IKEF-perantoj ŝanĝiĝos.

Roland Rotsaert, kasisto

**Madagaskaro (Malagasio)**

Fidilalao Henriel (fidilalao(a)yahoo.fr), prezidanto de EMA kaj organizan-to de la Nacia Kongreso (NK), kiu okazos de la 10a ĝis la 15a de aŭgusto 2008 en Vatomandry, bonvenigas ankaŭ eksterlandajn kongresanojn. Povus esti interese kombini la kongreson kun komerca vojaĝo. Malagasio ja liveras kaj bezonas multajn produktojn.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Benino

Mi estas profesia transit-agento kaj nuna esperanto-oficisto en la afrika UEA-oficejo. Mi ŝatus partneriĝi kun komercistoj por facile komerci iliajn varojn en Afriko kaj komerci afrikajn varojn en Eŭropo. Mi pretas gastigi komercistojn, helpi trovi klientojn... Afriko estas la sola kontinento kiu malriĉas je industrio kaj do ege bezonas alilandajn komercaĵojn por evoluo. Do profitu la okazon! Jen mia kompleta adreso:
AGBENOU Kodjovi Francis, transit-agento, Afrika UEA-Oficejo, BP 416, Lokossa, Benino, Tel (00229) 2241 0229, retpoŝto: agbenouko2(a)gmail.com.

Kongo: terpomsemoj petataj

Ni estas agrikulturistoj grupigitaj en asocio nomita "Espaguim - Esperantista agrikulturista unuiĝo por integrata malvolvo", nuntempe ankaŭ nomata "Espaguie - Esperantista agrikulturista unuiĝo por integrata evoluo". Ni serĉas bonvolemulon kiu nin helpu sendante al ni terpomsemojn. Se vi ne kapablas nin helpi vi povos interesigi vian ĉirkauxon, cxar eble inter ili estas iu kiu povos nin helpi. Antaŭdankon por via bonvoleco. Jen nia adreso: Espaguie, s/c Roger Mambuene MBUNGA, B.P.29 Mbanza-Ngungu, Av. Shaba n 08, Banza-Ngungu, Bas-Congo, Rep. Dem. du Congo, rete rogermambuene(a)yahoo.fr.

Litovio

Se en viaj vojaĝaj planoj estas Litovio, mi invitas viziti mian somerripozejon. Je via dispono estas fiŝkaptado, sinbanado en lago, viando sur tendarfajro, vinbera vino kaj tegmento sur kapo. Diskutoj pri kunlaboro dezirataj. Stasys Kruzinauskas, retpoŝto: stkruz(a)lrs.lt.



Malagasio - Dentista aparataro

Finpretas mia retpaĝo pri la eksportado de malagasaj manartaĵoj. La adreso estas: www.esperanto-eksporto.com. Mi deziras kontakti komerciston (se eblas esperantiston) pri dentista aparataro kaj aliaj dentistaĵoj ĉar povas esti ke mia frato kaj mi malfermos butikon por ilin vendi. Ĉu vi konas tiajn profesiulojn? HENRIEL Fidilalao, Malagasio, retadreso: fidilalao(a)yahoo.fr.

Ĉinio

La sovaĝaj silkaj litaĵoj estas naturaĵoj, kiuj tre taŭgas kiel dormiloj, kaj kiuj kreskas el mia hejmloka montaro nordoriente en Ĉinio. Se vi volas komerci, kontaktu min. Ma Fengchen, retpoŝte riveroyalu(a)hotmail.com.

Rusio

Mi serĉas esperantoparolantan personon, dezirinde komerciston aŭ komputiliston, kiu de temp' al tempo helpus al mi akiri diversajn novajn komputilajn instalaĵojn kaj sendus ilin al mi kaj kiu akceptus pagojn per la pagsistemo *Paypal*. Mi petas pri tio, ĉar mi estas handikapulo kaj ne povas mem aĉetadi komputilaĵojn en eksterlando. Yuri Shevchuk, delegito, Ruslando, rete esperanto(a)yurishevchuk.com.

**Adresoj de IKEF-retpaĝaro**

Evidentiĝis dum la lastaj monatoj ke la adreso www.ikef.org (registrita en Ĉinio) foje estis neatingebla. Bonvolu noti ke ankaŭ eblas legi la IKEF-retpaĝojn tra la adresoj www.ikef.net, www.ikef.info kaj http://users.telenet.be/ikef/.

**Novaj membroj**

368. SEGURU Valentin, Rusio
369. Ci Zhang, Ĉinio
370. LE GARREC Marie-Héléne, Francio
371. Kovtonjuk Euheno, Ukrainio
372. Xiao Fujun, Ĉinio
375. Lamily Husejn, Britio
376. ZHAO Yingwei, Ĉinio
377. Nanic Zlata, Kroatio

Rigardu la detalajn informojn de tiuj membroj en la rubriko 'membroadministrado' je www.ikef.net.

**Jarkolekto de TAKE - Tutmonda Asocio de Konstruistoj-Esperantistaj**

Ĉirkaŭ la jarŝanĝo aperis la 'Jarkolekto de TAKE 2007'. Tiu kolekto de fakaj artikoloj anstataŭas la iaman revuon de TAKE. Enestas i.a. artikoloj pri fervojfakaj terminoj, konstruaĵo por la olimpikaj ludoj en Pekino kaj 'pasivaj domoj'. La *Jarkolekto* estas inkluzivita en la jara kotizo de TAKE (6 eŭroj, IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC PSSTFRPPSTR, http://take.esperanto.free.fr/).

**Kontoj de entreprenoj**

La germana registaro agos kontraŭ entreprenoj kiu neglektas aperigi siajn jarkontojn; ili riskos sufiĉe gravan punpagon. Tiuj kontoj, kvankam ne tre detale, estas libere konsulteblaj je www.ebundesanzeiger.de (elektu: Rechnungslegung/Finanzberichte – Jahresabschlüsse/Jahresfinanzberichte – Detailrecherche).

En Belgio, la bilanccentralo de la centra banko (www.nbb.be) kolektas kaj aperigas la jarkontojn. Interreta konsultado de la lastaj kvin deponitaj jarkontoj estas senpaga..